

# LA VERDA LUPEO

25a jarkolekto



13(92) INFORMILO DE ELF-AREK FEBRUARO 1993

Offizielles Organ der ArGe ESPERANTO im BdPh eV




25 JAROJ







ELF-AREK

Stampoj

Tutaĵoj




Poŝtmarkoj

Glumarkoj



# NI PRI NI

Rudolf Burmeister

Danko de redaktoro

En decembro 1992 atingis min leteroj kun bondeziroj kaj informoj de: Wester, Vollegraf, Dörfler, Strönne, Östermann, Hirsch, Hasala, Amouroux, Sadier, Cin Kajĝi, Linrui, Song, Cao, Gao, Drucker, Paulsson, Mikulski, Hoekstra.

Mi sincere dankas al ĉiuj pro la bonaj deziroj, laŭdoj kaj valoraj informoj por ni ĉiuj.

Apartan dankon de ni ĉiuj mi direktas al nia Hirsch, kiu scipovas bonege komposti la redaktoran manuskripton kaj plaĉe aranĝi la bildojn. Ankaŭ ni dankas al li pro la certe ege temporaba ekspedo de nia LVL.

NI FUNEBRAS: Lastminuta informo pri morto de fidela kolektamiko.

Nia amiko Josep Cervello de Gari (1924-1992)post longa malsano forpasis la 20-an de decembro 1992 en Terrassa (E).

Dum multaj jaroj li estis membro en nia Amika Rondo kaj apartenis al la aktivuloj. Li helpis al multaj geamikoj. Ni ĉiuj konas la de li eldonitajn E-glumarkojn, E-pk kaj aliajn E-materialojn.
Sinceran kondolenco al la familio Cervello de Gari.

## Stampobanko:

Dankon al Folgado Lopez(E)

S-ro Folgado Lopez el Hispanio sendis 1 000 E-stampojn de la hispanaj naciaj kongresoj el la tempo de 1965 - 1992. Temas pri poŝtkartoj kaj kovertoj.
Li sendis la materialon kiel donaco por nia stampobanko.

Dankon al d-ro Bormann (D)

Kvanton da AF kaj aliaj stampoj donacis s-ro d-ro Bormann, Hamburg, al la banko. La bankestro Heimlich dankas.

## LA STAMPOBANKO OFERTAS:

| | |
|---|---|
| 50 div. E-sta sur kov. aŭ pk el TJ, HU, PL - | = 40,-- gmk |
| 20 div. E-sta sur kov. aŭ pk el D, GDR, E kaj S | = 15,-- gmk |
| 20 E-sta sur spec. kov. el E kaj TJ | = 30,-- gmk |
| IFEF-kgr 1992 en Münster (D): | |
| spec. kov., vere sendita | = 2,50 gmk |
| spec. pk, vere sendita | = 2,50 gmk |
| pk kun bildo de ICE (ICE=rapideg-trajno en D) | = 2,-- gmk |
| spec. kov. kun komplezaj sta | = 2,-- gmk |
| | (3 pecoj=5,-- gmk |
| glumarko de la IFEF-kongreso 1992 po peco | 0,30 gmk |

# EKSPOZICOJ KAJ NI

Fekete en bildkarta ekspozicio

En la hungara urbo Szombathely (pr. Sombathej) aŭgusto ĝis septembro 1992 okazis ekspo de bildkartoj. Nia Fekete partoprenis en ĝi per la E-ekspozaĵo: "La 100-jara Esperanto". Li gajnis per ĝi lokon en la unua klaso (ekzistas tri klasoj plus plej malalta: "atesto pri partopreno".)
Ni dankas pro via aktiveco sur tiu kampo!

# 25 JAROJ ELF - AREK 1968 - 1993 25 JAROJ

ELF - AREK ĉi-jare festas sian 25-an naskiĝtagon kaj kun ĝi kompreneble nia "La Verda Lupeo (Fenikso)". La unua numero de "Fenikso" aperis: 01 10 1968 kun 12 paĝoj. Samtage fondiĝis "Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj" **AREK**. Al ĝi apartenis 17 membroj: Paulsson, Jensen +, Manninger, Strönne, Pallares-Gil +, Majewski +, Heimlich, Burmeister, Vana, Bartoŝik +, Tichy +, Silva ?, Bengtsson, Lindström +, Chapellier +, Lopez kaj Boberg.

20 numerojn de "Fenikso" realigis Jensen, tiam la morto atingis lin. Sekvis De Salvo kun 13 numeroj ĝis 15 05 1975. Tiam aperis 2 tre provizoraj numeroj kaj ekde 01 01 1977 per no. 36 funkcias la nuna redaktoro.

Ke nia E-filatela amikaro ELF - AREK ankoraŭ vivas, ni unuavice dankas al la oferplena laboro de nia prezidanto Ivar Paulsson. Li nun jam dum 25 jaroj "gvidas" nin. Ne mankis la kunlaboro de multaj el niaj membroj. Mi hezitas elstarigi iujn nomojn; tamen: niaj forpasintaj Lindström, Stifter kaj Goslinga plurfoje savis nian klubon antaŭ ekonomia kolapso! Ankaŭ aliaj, ankoraŭ vivaj kaj ne-plu-vivaj geamikoj kontribuis al tio, ke ĉi-jare ni atingis la belan aĝon de 25-jaroj!

Ni kreis modestan "fakan" literaturon: katalogojn pri poŝtmarkoj, poŝtstampoj, poŝtaj tutaĵoj l.a. filatelaĵoj. Ne mankis katalogo pri glumarkoj. Fine, 1989, aperis la granda katalogo de la E-filatelo en nebindita formo. Per apero de suplementoj, la katalogo ĉiam estas aktuala. Dumtempe ja aperas la novaĵoj ankaŭ en la "LVL".

Daŭre ni atentigas pri periferiaj temoj de la E-filatelio: pri amikoj de Esperanto k.a.. Ni rajtas fieri pri niaj ekspozantoj. Ili kontribuis per iliaj ekspozaĵoj pri Esperanto al nuna bona reputacio de Esperanto, almenaŭ en la mondo de filatelio. Jam jaron antaŭ nia fondiĝo, 1967, videblis en pm-ekspo en Karl-Marx-Stadt (Chemnitz) E-ekspozaĵo de Vana, Bartoŝik, Mikulski, Biesiada kaj Burmeister. Ili ĉiuj kunvenis en tiu urbo kun Strönne, Paulsson, Tichy, Heimlich dum la tuta semajno. Antaŭ pli ol 25 jaroj!! Jaron poste ni revidis nin en la Tutmonda PRAGA´68 por tuj sekve fondiĝi kiel AREK.

Sajnas, ke niaj ekspozantoj partoprenis ekde 1967, eĉ jam pli frue, en ĉiu Tutmonda Fila-Ekspo kaj en multegaj Naciaj pm-Ekspo-j. Pri iliaj sukcesoj legeblas ĉiunumere en nia LVL.

Tra ĉiuj 25 jaroj bone funkciis nia "Stampobanko", ĝis 1974 kun Tichy kaj poste, ĝis nun, kun Heimlich.

En majo 1974 AREK kuniĝis kun ELF.

En la nova adreslisto estas 150 membroj en 29 landoj. Bedaŭrinde kelkaj adresoj ne plu estas aktualaj.


Paul F.W. Tarnow


Ludoviko Rodo


D-ro Jozsef Takács

**EKIK**
**UNUA DATREVENO**
NOVEMBRO
**1953 • 1954**

N.º 204










LOUIS OBRECZIAN
P. O. BOX 51
WATERMAN, PA. U.S.A

Louis Obreczian

Eldonis: EKIK

Presis: E. Moreno-Barcelona

# Nekompleta historio pri E-kolektantoj (+asocioj)



| | |
|---|---|
| 1912 | D-ro Möbusz eldonis katalogon de E-sigelmarkoj. Parto el la katalogo ankaŭ aperis en la tiama "Germana Esperantisto" |
| 1922 | Apero de "La E-kolektanto", redaktoro: Paul F.W. Tarnow kun listo de E-glumarkoj. El la enhavo: Anonco pri forvendo de 3700 E-pk kaj 1500 diversaj E-glumarkoj |
| Januaro 1932 | Fondiĝo de "Tutmonda Asocio Kolektanta" (140 anoj en 14 landoj), prezidanto: d-ro Jozsef Takacs. |
| 1934 | Eldono de E-glumark-katalogo pri 2137 diversaj E-glumarkoj de TAK (en brita E-muzeo) |
| 1936 | Eldono de suplemento pri 3091 glumarkoj de TAK (en brita E-muzeo) |
| 1936 | "Heroldo de Esperanto" aperigas liston de E-stampoj de W. Simon. |
| 1936 | TAK eldonas "La Glumark-Kolektanto" |
| 1936 | Aktivuloj: Tarnov (+1944); Takacs (+ 1944) L. Rodo (+1952), Maier (+ ?), Simon, Jakupovic, Melo. |
| 1953 | Fondiĝo de EKIK, prezidanto Obreczian kun aktivuloj Strönne, Paulsson. Steiner verkis "Stampo-Katalogon" kaj Jensen "Glumark-Katalogon". |

| | |
|---|---|
| 1964 | Fondiĝo de E-Ligo Filatelista, prezidanto fariĝis Hermann Heiβ, Oberkirch. Informilo: La Verda Lupeo. |
| 1968 | Fondiĝo de Amika Ronde de Esperantaĵ-Kolektantoj (AREK). Prezidanto: Ivar Paulsson, |
| 1970(?) | Werner Heimlich prezidanto de ELF. |
| 1974 | Kuniĝo de ELF kun AREK al ELF-AREK. Prezidanto restis Ivar Paulsson. |

Pri pliaj informoj ni momente ne disponas . Kiu povus liveri pliajn datojn por kompletigi la historion de la kolekt-asocioj, ĉefe de ELF kaj AREK?

El la libro: "Esperanto en Perspektivo" de Ivo Lapenna, eldonita de UEA 1974.

En la sama libro ankaŭ aperis, sur paĝo 282, listigo de diversaj "Filatelaj Terminaroj"

16.3.1.5 *Esperanto-Ligo Filatelista (ELF).* — Unuavice, ELF akcelas la kolektadon de filatelaĵoj, kiuj koncernas Esperanton. Duarange ĝi subtenas siajn membrojn en ĝeneralaj filatelaj aferoj. Ĝi estis fondita en 1964 kaj havas 80 membrojn.

ELF aperigas listojn pri poŝtmarkoj, poŝtstampoj kaj aliaj poŝtoficialaj presaĵoj, kies teksto aŭ bildoj rilatas al Esperanto. Laŭ speciala sistemo, la membroj ricevas kaj interŝanĝas novajn Esperantajn filatelaĵojn.

Per konsiloj kaj materialo ELF subtenas esperantistojn, kiuj disvastigas Esperanton per filatelaj rimedoj. Medaloj kaj aliaj premioj pruvas, ke en filatelaj rondoj oni alte taksas la valoron de la filatela temo „Esperanto" dum ekspozicioj. Naŭ landoj eldonis entute 36 poŝtmarkojn kun rilato al Zamenhof aŭ Esperanto. Okaze de kongresoj k.s. estis eldonitaj kelkcent specialaj stampoj.

# Novaj stampoj

(Atentigo pri novaj mallongigoj ĉe TJ, ĉar la ĉinaj sta nun estas katalogitaj en 2 partoj: E-temaj (ET)-sta kaj ne-E-temaj (NET)-sta, sed kun E-enskribo.)

TJ 1992-32 "La insuleto Mazhu" (NET 131)

La sta estas desegnita de Zhang Linrui por la samtema, samtage eldonita pm. Ĉin Kajĝi nun skribis, ke "Mazhu" estis la nomo de fiŝkaptistino, naskiĝinta la 23-an de marto 960 sur la insuleto Meizhou de Fujian-provinco. Si multe helpis kaj savis maristojn. Poste oni nomis ŝin: Mar-diino. (bildo de la sta vd. LVL 91, p.9)

TJ 1992-35 - Pekina E-Kongreso (ET 124)

1922. 11. 05. Beijing/Pekino. Teksto: LA DUA KONGRESO DE PEKINA E-ASOCIO. Desegnis: Wang Ling. Uzita de Pekina Xiqu-a Poŝtmarka Kompanio.. En la kongreso partoprenis pli ol 100 pekinaj ge-Esperantistoj. En ĉi-tiu kongreso s-ano Zeng Heyao estis elektita kiel prezidanto kaj samideano Nan Youli (multaj lin konas el nia varsovia ELF-AREK kunveno), kiel ĝenerala sekretario.Info de Ĉin Kajĝi . Dankon pro la sendita originale poŝtita filatelaĵo.



TJ 1992 - 36 Guo Moruo (Beijing) (ET 125)




1992.11.16. Beijing. Teksto: LA 100-A DATREVENO DE LA NASKIĜO DE GUO MORUO. Maldekstre portreto kaj E-stelo. Vertikalaj ideogramoj estas eldiro de Guo Moruo: "Cerbumadi fantaste kaj veron serĉi laŭfakte" (estas propra stilo de sciencistoj: Ni serĉu la senliman veron en la senlima kosmo)
Desegnis: Xie Shaoxing, uzita de Pekina Xiqu-a PM-Kompanio.

TJ 1992 - 37 Guo Moruo (Jiangmen) (ET 126)

1992.11.16. Jiangmen. Teksto: LA 100-A DATREVENO DE LA NASKIĜO DE GUO MORUO: Kun portreto kaj E-stelo. La stampo montras ideogramojn en antikva ĉina skribmaniero "ĝuan", mane skribita de Guo Moruo laŭ peto de Zeng Heyao (vd. supre) por sia E-amiko (frato de ĈKG) en la jaro 1943 en la urbo Chongqing. La ideogramoj signifas: "Estas ĝojinde, ke venas amikoj de malproksime" (eldiro de Konfucio). Supre en la stampo ideogramoj, skribitaj de samideano Chu Tunan (eksvicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso kaj prezidanto de la asocio "Amikoj de Esperanto") memore al Gu Moruo.
La stampon desegnis la geedzaj Esperantistoj Xie Shaoxing kaj Tan Ailing.
Uzita de Jiangmen-a Poŝta-Telekomunika Oficejo.
Dankon al Cin Kajĝi pro la abunde sendita info-materialo. Dankon ankaŭ al Xie Shaoxing kaj Tan Ailing pro alsendo de la Guo Moruo-filatelaĵoj!

TJ 1992 - 38 Liang Sicheng (Xinhui) NET 134

La poŝta-Telekomunika Ministerio emisiis la 20an de novembro 1992 serion de 4 pm kun la temo: "Sciencistoj de moderna Ĉinio" (1992-19). Unu el la



4 pm montras la portreton de Liang Sicheng (1901 - 1972), fama ĉina arkitekto. Pro tio, ke li naskiĝis en la gubernio Xinhui (Guang-dong-provinco), la Xinhui-a PTO kaj la Xinhui-a Filatela Asocio kune eldonis E-lingvan UTK. La PTO uzis E-lingvan sta.
Desegninto estas Xie Shaoxing kaj Tan Ailing. Bildo sur la UTK: portreto kaj konstruaĵoj.
Dato: 1992.11.20; loko: Xinhui; teksto: SCIENCISTOJ DE MODERNA CINIO (3-A Serio). Informoj de: Ĉin Kajĝi.

TJ 1992 - 39 Ĉinaj Sciencistoj (Haikou) (NET 135)




Haikou: 1992 11 20. Teksto: ĈINAJ NUNTEMPAJ SCIENCISTOJ:
Desegnis: Lin Rui Zhang. Info de ZLR.

(PM-serio: 1992-19)

Xinhui situas:
22,32 N /113,02 Or.




TJ 1992 - 40 Luo Ronghuan (NET 136)




Haikou: 1992 11 26; teksto: LA 90 JAROJ DE LA NASKIĜO DE LUO RONGHUAN.
Desegnis. ZLR. Dankon al li pro la sendita info kaj stakopio.

TJ 1992 - 41 (el Haikou) Konstitucio (NET 137)




1992 dec. 4 en Ĉinio aperis pm 1992-20 kun nominalo de 20 fenoj. Nia ZLR desegnis por la pm-kompanio de Haikou unutagan stampon kaj pretigis dekoran (privatan) koverton. Sta kaj kov montras la tekston: LA KONSTITUCIO DE PR ĈINIO:
Al mi ŝajnas (ankaŭ al mi, Hirsch), ke la pm-kompanio de Haikou por preskaŭ ĉiu nova pm-serio uzas unutâgajn stampojn kun E-teksto. Verŝajne ek de 1992. Ilin ĉiuj desegnis, laŭ kontrakto, nia ZLR. Dankon al li pro la sendita info.

Nepoŝtaj ĉinaj stampoj (fina konfirmo)

Laŭ respondoj de direktoroj de pm-kompanioj de Nanĉang, Ninghai kaj Haikou, jenaj stampoj estas nepoŝtaj:

TJ 1991 - 60 Princo Teng pokalo (Ninghai)
TJ 1992 - 08 75-a datreveno de la forpaso de Zamenhof

TJ 1992 - 17 Tria E-Tago de Hainan (ET 117)

Bv. nuligi tiujn poziciojn en viaj listoj.

# PRI MALNOVAJ STAMPOJ

Falsaj stampoj en nia albumoj (vd. LVL 12(91), paĝoj 12)




Nia Stefano Fekete reage pri la Orohaza-stampo de 1957: "...dum la ekspo oni vendis memorkarton kun adresflanke surpresita , supre maldekstre, desegnaĵo (vd. la glumarko) en verda. La poŝto ne uzis stampon por la ekspo.

"Retroaranĝitaj" hungaraj stampoj

Nia Amouroux skribis al mi: "...En 1969 mi akiris hungarajn stampojn el la jaroj 1918, 1929, 1941 kaj 1947 de E-filatelisto el Budapest. Prezoj ne estis spekulaciaj. Li konfesis al mi, ke li ricevis la stampaĵojn de la budapeŝta poŝta muzeo. Tie kuŝas la originalaj stampiloj..."

Nia Fekete ankaŭ reagis: "...Jam antaŭ multaj jaroj mi skribis al vi (pardonu, ke mi neglektis tion!!), ke en la poŝta muzeo mi vidis nur helverdan H 1. Ankaŭ aliaj samtempaj originaloj ekzistas nur helverdaj. Nigra inko tiam ne estis uzata. Se iu posedas ĝin en nigra, temas pri stampaĵo ne originala el tiu tempo. Tiu stampo ne estas uzebla por ekspozaĵo, sed nur por la "hejma skatolo".

Estus interese scii, ĉu vere ie en niaj albumoj troviĝas helverda H 1. La peco en mia kolekto ne estas helverda, nek nigra, eble inter blua kaj verda...

Dankon al ambaŭ niaj amikoj pro iliaj reagoj.

Rimarko de Hirsch: en mia kolekto troviĝas H 4 ankaŭ en ruĝa koloro.

Pri la sta S 3.


SVEDUJO.


Al fino
Erica DIETS,
poŝtistino de Strasbour
Francujo
Univ.Esperanto Kongre
...CKHOLM,
Fredsgatan 4

Sincere salutas Praha antaŭkongresi kunvenintoj :

31.VII.34



La 26-a UK okazis de 4-11 aŭgusto 1934 en Stokholmo (S). En la kongresejo dum tiu tempo funkciis speciala poŝta giĉeto



kun poŝtistoj, kiuj scipovis E-on. Tiun tempon notas ankaŭ nia sta-katalogo. Tamen ekzistas sta kun datoj: 3.8. kaj 12.9.34. Tiu, kun dato 3.8., troviĝas kiel "alvenstampo" sur pk, sendita el la antaŭkongreso en Praha (CS), al la UK-adreso en Stokholmo. La stampo kun la dato: 12.8.34 troviĝas dorsflanke sur letero, sendita al la UK-adreso en Stokholmo. La letero estis resendita al la sendinto en Elbeuf (F) kaj montras la poŝtan sta de Elbeuf kun la dato de la reveno: 14.8.34. Nia S 3 estis uzata 4. - 11.8.34 kiel nuliga kaj ekster tiu tempo kiel "alvenpruva" stampo.

Fonto: Jean Amouroux en letero al la redaktoro. Dankon al vi! La aliajn de vi senditajn informojn mi utiligos pli poste.

Viola H 123, SATORALJAUJHELY, oficiala

Certe la nomo de tiu loko por nehungaroj estas preskaŭ ne elparolebla. Tamen ekzistas ankoraŭ pli longa, kiel ekz.: KIŜKUNHALAŜIKUTAŜIPUSTA... Laŭdire en Skotlando ekzistas pli longaj.

Nia Fekete skribis en sia letero "...Ni E-filatelistoj Podani, Szilagi, Radnai kaj mi vizitis la urban poŝtejon. Juna lernantino-poŝtistino uzis dum la unuaj horoj violinkan stampokusenon. Post mia atentigo pri tiu neoficiala inko la poŝtestrino pardonpetis kaj anstataŭigis la stampkusenon per nigrainka. Intertempe certe pli ol 100 pecoj pretigis. Cu ili estas uzeblaj nur por la "hejma skatolo"??

Kara amiko: Mi ne estas la ĉionscia filatelisto, ek de du jaroj ekster la filatelista mondo, sen filatela gazetaro kaj tial eble iom ekstermoda. Tamen laŭ mia opinio: temas pri oficiale uzita koloro, eĉ se erare uzita. Kiam en poŝtoficejo estis uzataj kontraŭnormaj inkoj aŭ stampiloj por filatelistoj tio estas poŝte uzitaj materialoj, do: "oficialaj".

Rimarko de Hirsch: Mi atentigos pri la erara uzo de viola inko en la katalogo.

## KROME EKZISTAS... kaj AFRANKSTAMPOJ

Informadika sta el Perpignan

Nun nia Amouroux eltrovis, ke la poŝtejo en Perpignan uzas "informadikan afrankilon", per kiu la poŝtejo surpresas la necesan afrankon, daton kaj adreson de la oficejo. Car tiu poŝtejo situas en la RUE DU DR ZAMENHOF, ni nun havas novspecan kolektindaĵon por niaj albumoj! Certe oni ĝin povas envicigi inter niaj afrankstampoj.

MUTUELLE GÉNÉRALE DES PTT
Mutuelle régie par le code de la Mutualité
PYRENEES ORIENTALES

58 NEVERS CTA
04/11/92

AFFRANCHISSEMENT INFORMATIQUE
AUTORISATION N° 91-2
2,20

RUE DU DR ZAMENHOF
66020 PERPIGNAN CEDEX

027360

MOTIF DE LA NON DISTRIBUTION
Parti sans laisser d adresse
Decedé
N'habite pas à l'adresse indiquée

Plier et détacher suivant les pointillés

CLI ST JOSEPH
AV GRANDE BRETAGNE
66100 PERPIGNAN

Opinio de la katalog-eldonanto: Tamen, verŝajne ne temas pri afrankstampo en la normala senco. Tial mi metos ĝin sub la katalog-parto: "Krome ekzistas...".

Nova AF-kliŝo el CS: F.V. Lorenc








Strážnice, 14.-31.12.1992; teksto: en la ĉeĥa: F.W. Lorenz -AŬTORO DE LA UNUA ĈEĤA LERNOLIBRO DE ESPERANTO.
Iniciatis: V. Hasala, desegnis: K.Kuĉa-Praha, gravuris: K. Pavliĉek. Haveblas en nia banko. Dankon al nia Hasala pro la informo.
La sekvonta AF ne plu venos el Ĉeĥoslovakio, sed el Slovakio, okaze de komuna germana-ĉeĥa E-Kongreso en Karlovy Vary, Ĉeĥio, dum Pentekosto.

# Reko - markoj

Reko-marko (kun gumstampo) por la 11a SAT-Kongreso en Amsterdam (NL)

Trovita de Hirsch: germana aŭkcia firmao ofertas tiun registritan leteron kun 3 sta NL 1. Aldone la reko-marko kun la surstampita teksto: 1a linio: AMSTERDAM, 2a linio: ESPERANTISTEN CONGRES. Bedaŭrinde mi ĝis nun nur posedas malbonan fotokopion. La originalo ne estas akirebla pro tro alta prezo: 900,-- gmk = 545 IRK.
Kiu scias detalojn? Ĉu iu el vi posedas la originalon? Cetere, la kuranta numero estas: 66.




Reko-marko en Ĉinio ne ekzistas!!

La sciigo en LVL 90, paĝo 13, pri "sensacia" ĉina E-reko-marko nun montriĝis ne sensacia, sed erara. Nia Gao Zhen Xing sukcesis fotokopii la koverton kaj sendis ĝin pere de ĈKĜ al ni. ĈKĜ aldonis tradukojn de la ĉinlingvaj surpresaĵoj. Montriĝis, ke sur ĝi ne troviĝas reko-marko, sed en la rektangulo staras ĉinlingve: "Poŝta-Telkomunika Oficejo de Dongshan-Huainan-Atesto-numero 001". Tiu indiko atestas, ke la ekspedanto ne bezonas afranki la koverton kun la surpresita adreso de la HUAINAN ESPERANTO KORESPONDA LERNEJO en la Anhui-provinco, sed, ke la necesan afrankon pagas la ricevanto (Koresponda Lernejo).

Se la koverto estus resendita registrite aŭ aerpoŝte, tiam necesus kompleta afranko fare de la sendinto.




Atesto-numero de Poŝta-Tele-komunika Oficejo de Dongshan, Huainan: 001

Kara Gao! Ne forĵetu vian koverton, tamen ĝi estas dokumentado el la historio de via ĉina E-movado.

Opinio de la katalog-eldonanto: Ankaŭ tiu stampo aperos en la kataloga parto: "Krome ekzistas...."




Huainan situas: 32,40 N+117,0 Or.

## Reko-marko de Strážnice

Nia Hasala en sia reago: "...Kompreneble, ke ni povis uzi la kulturdomon senpage por la ekspozicio. En alia kaŭzo tiu ekspo ne povintus okazi..." Plue li informas:

Eldonkvanto: 5 000 ekzempleroj, uzitaj ekde 16. 7. 1992

La poŝta informilo de 07 07 1992 informas pri la apero de tiu reko-marko kaj la teksto estis en korekta Esperanto: ...en filatelo. La bildo jam montras la preseraron: ...en filatele.

Mia opinio: Se mi mendas ie stampilon kun mia adreso kaj la produktinto erare presas mian nomon (ekz.: Bormeister anstataŭ Burmeister) la stampo estas fuŝprodukto, ne uzebla kaj nepagenda.

Kompreneble uzita sur koverto la reko-marko ankaŭ taŭgas por fila-ekspozaĵo, sed kun la rimarko, ke temas pri preseraro!

# Numismatiko



## "Nova termino en la E-filatelo: "Numiskoverto"

Nia Richard Hirsch sendis kopion el la gazeto "Briefmarkenwelt" - Poŝtmarka Mondo, 6-92. Tiu kopio montras "numiskoverton" de la UK en Havano (Kubo) 1990. Temas pri UTK por la kongresa E-pm kun la oficiala kongresa monero, maldekstre en la koverta fenestro aldonita. Mankas akompana teksto pri ĝi. Certe numismatekistoj kaj Esperantistoj trovas ĝin kolektinda. Por E-filatelistoj kaj ĉefe pro ekspozantoj tiu peco certe ne taŭgas, ĉar temas pri perfekta komplezaĵo, dua stampo sur la loko de la adreso, poŝte ne vere sendita. Krome tiu "filatelaĵo (??)" ne estas dezirata de ekspoziciaj ĵurioj. Mi tute ne volas kondamni ĝian aperon. Daŭre aperas tiaj ĉie en la mondo kaj sendube multaj homoj kolektas ilin, alie ili ne aperus.
La eldonkvanto certe estas sub 2.000. Sur la merkato momente ne trovebla.

La numiskoverto de la UK 1990 en Havano (Kubo)




## FAMAJ ESPERANTISTOJ



Guo Moruo (1872 - 1976)

Fama ĉina verkisto, poeto, historiisto, arkeologo, paleografo, tradukisto, soci-aktivulo. 1926 vicestro de la Politika Departemento de la Nacia Revolucia Armeo. Poste dum Kontraujapana Rezistmilito en elstaraj pozicioj sub Zhou Enlai. Post fondiĝo de Popola Respubliko Cinio en elstaraj pozicioj, i.a. li estis prezidanto de la Cina Akademio de Sciencoj kaj membro de la Centra Popola Registaro Cinio. La plej granda kontribuo de GUO MORUO al la ĉina E-movado estis inviti E-istojn partopreni en la de li estrataj oficejoj por internaciaj aktivecoj pere de E en la jaroj 1938-1945. Temis pri la Tria Buroo en la Kuomintanga Regiono. Laboris tie samideanoj Jelezo, Coĉa, Jak, Sanio, Verda Majo, Liu Ren, Zong Heyao k.a.. Ili eldonis la E-revuon "Heroldo de Ĉinio" (1939-1944--74 numeroj). Guo Moruo ankaŭ subtenis la laborojn de la Koresponda E-Lernejo en Chongqing. Tie aktivis tuta vico de hodiaŭ famaj e-istoj, i.a. Venlo Fo, Eltunko k.a.. Moruo ankaŭ havis profundan amikecon kaj estimon reciprokan de Hujucz (legeblas en la verko: "Hongpo Qiu" (Ondega Kanto) de Guo Moruo.

Guo Moruo rekomendis Verdan Majon al la Kuomintanga Centra Radiostacio. Aperis multaj E-tradukoj de liaj verkoj, i.a. "Bronza Tigro" en la "Ĉina Esperanto Eldonejo".

Fonto: Ĉin Kajĝi, 5-paĝa artikolo: "Memore al la 100-jara datreveno de la naskiĝo de GUO MORUO, la granda amiko de Esperanto"., sendita dum novembro 1992 letere al mi.

Nova (sennominala) =oficiala= E-pk el Cinio pri GUO MORUO.

Memore al GUO MORUO la Jiangmen-a Poŝta-Telekomunika Oficejo kun favoraj helpoj kaj subtenoj de Pekina kaj Jiangmen-a E-Asocioj, s-ano Chu Tunan, s-ino GUO Pingying (filino de Guo Moruo), eldonis la 16-an de novembro 1992 =oficialan= (filatelan) poŝtkarton. Eldonkvanto: 5000. Poŝta eldon-numero: JM-JP 36 (92) 07. Teksto: Qin Kaiji. Desegnis: Xie Shaoxing kaj Tan Ailing.










Surpresita samtema E-sta. 1982 aperis pm-serio pri Guo Moruo (82-J 87). Unu pm el tiu serio maldekstre. (en Ĉinio jam rara)

…名中国作家、诗人、历史学家、剧作家、考古学家、古文字学
…社会活动家和世界语支持者。
…书是郭沫若1943年应世界语者曾禾尧之请为其世界语友人所写。某
"有朋自远方来，不亦乐乎。"这是中国古代思想家、政治家和教育
…子（公元前551年——公元前479年）的话。

*Guo Moruo estis fama ĉina verkisto, poeto, historiisto, dramisto, arkeologo, paleografo, tradukisto, soci-aktivulo kaj subtenanto de Esperanto.*

*La ideogramoj en antikva skribmaniero ĝuan estis manskribitaj de Guo Moruo en 1943 laŭ peto de esperantisto Zeng Heyao por sia esperantisto-amiko. Tiuj vortoj signifas: "Estas ĝojinde, ke venas amikoj de malproksime." Tio estas dirajo de Konfucio (551 a.K. — 479 a.K.), ĉina antikva pensisto, politikisto kaj edukisto.*

片、图设计：谢绍雄、谭爱玲　　说明：[illegible]
发行：江门市邮电局　　JM—JP36(92)07　　1992—11—16
承印：江门市世界语协会、北京市世界语协会　　印数：5000枚

Desegnintoj de poŝtkarto kaj poŝtstampo: Xie Shaoxing kaj Tan Ailing　　Teksto: Qin Ka
Eldonis: Jiangmen-a Poŝto-Telekomunika Oficejo　　JM-JP36(92)07　　1992-11-16
Presis: Jiangmen-a Esperanto-Ligo kaj Pekina Esperanto-Asocio　　Eldon-kvanto: 5000

Dekstre la priskribo en Esperanto kaj en la ĉina lingvoj.

Priskribo: Supre maldekstre: vortoj de de Chu Tunan pri Gu Moruo. Dekstre de la portreto: Ideogramoj, 1943 verkita de Guo Moruo en la antikva ĉina skribo: ĝuan: "Estas ĝojinde, ke venas amikoj de malproksime". (vd. sta TJ 92-37).

Dankon pri tiuj informoj al la Filatela Societo de Pekina E-Asocio kaj al Ĉin Kajĝi.

## *Trovita*



CARTE POSTALE　　POŜKARTO

EXPEDITEUR　SENDULO

**SUDOKCIDENTA RENKONTIĜO**

**La 18-19an de Majo 1985**

TRELISSAC DORDONJO PERIGORDO FRANCIO




DESTINATAIRE　　ADRESULO




ESPERANTO oferas al la homaro la eblecon interkompreni kaj interkonsenti, por defendi la PACON.

<u>Tutaĵoj el Francio</u>
(La unua sendis W. Heimlich.

CARTE POSTALE　　POŜKARTO

EXPEDITEUR　SENDULO

**SUDOKCIDENTA RENKONTIĜO**

**La 18-19an de Majo 1985**

TRELISSAC DORDONJO PERIGORDO FRANCIO




DESTINATAIRE　　ADRESULO




ESPERANTO oferas al la homaro la eblecon interkompreni kaj interkonsenti, por defendi la PACON.

Hazarde mi akiris unu el tiuj francaj TUT kaj nun de nia kolektamiko Amouroux la duan. Temas pri TUT kun privata al-alpreso. Detaloj nekonataj.

# Glumarkoj

Glumarkoj

Glumarkoj




①




②




③




④




⑤




⑥




EŬROPA
ESPERANTO
KONGRESO

5a-10a junio 1992

⑦

★ Internacia

E. filatela ekspozicio

25.7. - 2.8. 1992

⑩ STRÁŽNICE




ABALIGET

15-24.07.1992.

⑧




⑨

65 KONGRESO de

SAT

LITOVIO·1992

⑪




⑫

78-a UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO



VALENCIO 24-31 JULIO 1993

⑮




⑭




⑬

Estimataj,

en la lastaj monatoj atingis min tuta vico da informoj pri glumarkoj, plej ofte kun originaloj. Tial ĉ-loke mi sendas koran dankon pro la informoj al niaj: Elda Dörfler, Germano Gimelli, Hans Jankowski, Andre Sadier, Istvan Fekete, Richard Hirsch, Anna-Greta Strönne, Ivar Paulsson, Ma Maatman, Anni Wester v.d. Veen.

Mi klopadas aranĝi bildpaĝon pri la pasintjaraj glumarkoj. Se vi scias pri aliaj, ne notitaj, bonvolu informi min.

Alvenis ankaŭ nedatumitaj glumarkoj, sed pri ili mi raportos en iu sekvonta LVL.

katalog-no: 296

① Hodiaû eblas montri fotokopion pri tiu rara glumarko de la 17-a SAT-kongreso 1937 en Roterdamo. Kopiojn sendis Anna-Greta Strönne kaj Mia Maatman.

② 39-a Kongreso de SAT-amikaro, Draguignan, 1984, 21.-24.4., V 34x53 trĉ gum ve sur blanka. Drako kun stelo. Mankas en la glm-katalogo, 2-a parto. Informo de Sadier.

③ 47-a Kongreso de SAT-Amikaro en Bordeaux 17.-24.4.92
en la katalogo: 01/92,LVL 9(88), p.13; LVL 10(89), p.13

④ 44-a IFEF kongreso en Münster 16-22 05 92
en la katalogo: 02/92, LVL 8(87), p.15 kun bildo

⑤ Sveda Nacia Kongreso en Oskarsham 22.-24-5-92
en la katalogo: 03/92, LVL 9(88), p. 13 kun bildo

⑥ Germana Esperanto-Kongreso en Schwerin 5. - 8.6.92
LVL 8(87), p. 15; en la katalogo: 04/92

⑦ Eŭropa-Kongreso en Verona 5. - 10.6.92
LVL 11(90), p.16 kun bildo.

⑧ 25-a Internacia Renkontiĝo Naturamika en Abaliget
15. - 24.7.
LVL 11(90), p.16

⑨ 77-a Universala Kongreso de Esperanto en Vieno
25. 07 - 1.8.92
LVL 11(90), p. 16

⑩ Internacia filatela ekspozicio en Strážnice,
25. 7. - 2.8. 92
LVL 12(91), p. 14.

⑪ 65-a Kongreso de SAT en Kaunas (Litovio)
aŭgusto 1992

⑫ 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto en Qingdao
aŭgusto 1992
LVL 12(91), p.14.

⑬ 48-a Kongreso de SAT-Amikaro en Herouville 9.-13.4.93

⑭ 45-a Kongreso de IFEF en Cervia 6.6. - 12.6.1993
LVL 11(90), p.16

⑮ 78-a Universala Kongreso de Esperanto en Valencio
24.-31. 7. 1993
LVL 11(90), p.16

<u>Atentigo:</u> En Germanio la ELF-AREK`anoj estas organizitaj en la laborgrupo ESPERANTO (LG), kadre de la Germana Filatelista Asocio. Tial ni, de tempo al tempo, atentigas en nia LVL pri germanaj ekspozicioj kun internacia partoprenebleco. Temas ĉefe pri ekspozicioj en la 2a klaso (rango II). Sekvas la unua atentigo pri ekspozicio:

# „FRANKENPHILA '93"




Ekspozicio de la bavara landa asocio de filatelistoj en la klaso II (rango II) de la
03 - 05.09 1993 en Heroldsberg (norde de Nürnberg)

La ekspozicio estas organizita de la Germana Asocio de la Motiv-kolektantoj, landa grupo de Bavarujo kaj de la Poŝtmarkamikoj de Heroldsberg. Jenaj ekspozaĵoj estas serĉataj: tematika filatelo, tradicia filatelo, ekpozaĵoj pri la historio de la poŝto, ekspozaĵoj pri la aerpoŝto kaj tutaĵkolektoj. Informoj bv. petu de: Günther Korn, Postfach 32, D-W-8501 Heroldsberg. Tamen, por eviti lingvajn malfacilaĵojn, bv. sendu vian informpeton al mi.

Richard Hirsch

<u>Informo de la katalog-eldonanto:</u> Ne estis mia intenco eldoni por 1993 suplementon. Tamen, el diversaj kaŭzoj, ĉefe pro la renversigo de la ĉinaj stampoj, mi nun preskaŭ finkompilis por 1993 suplementon. Vi jam povas antaŭmendi ĝin ĉe mi. Bv. listigu en via mendo, kiujn partojn de la katalogo vi volas havi aŭ la suplementon por la tuta katalogo.

Atentigo: Se vi informos nian redaktoron pri novaĵoj, tiam bv. per kopio, ankaŭ informu min, ĉar mi bezonas tiujn informojn por ĝisdatigi la katalogon. Dankon!

Richard Hirsch

Informilo de ELF-AREK (Esperanto-Ligo Filatelista Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj
*Offizielles Organ der ArGe ESPERANTO im BdPh e.V.*
Redaktoro: Rudolf Burmeister, Max-Müller-Str.62
D-O-9051 Chemnitz
Prezidanto: Ivar Paulsson, Skytteholmsvägen 29
S-17144 Solna
Kasisto: Rolf Beau, Jacobstr. 9
D-O-7010 Leipzig

**Grava atentigo:** ***Nova konto de nia kasisto!***

**SPARKASSE LEIPZIG Konto-No.: 389 822 328**
**BLZ(bankkodnumero): 868 555 92**

Kotizo por 1993: DM 21,--/13 IRK/13 US$

UEA-konto de ELF-AREK: UEA-kodo: elfx-r

Stampobanko: Werner Heimlich, Fröbelstr. 4
D-W-3040 Soltau
Kompostis+ ekspedis: Richard Hirsch, Lambertstr. 12
D-W-6430 Bad Hersfeld
Presejo: Albert Oesterle, Hubertusstr. 28,
D-W-8853 Wemding

